

SAT eH

Sennacieca Asocio Tutmonda
en Hispanio

INFORMIO

Numero 12/eo

Oktobro 2009

SPECIALA NUMERO – 82-a KONGRESO DE S.A.T.

Ĉu vi konas asocion, kies membroj interrilatas per unusola lingvo – malgraŭ, ke ili devenas de la plej diversaj lingvaj medioj kaj lingvoregionoj de la mondo kaj malgraŭ, ke ili plimulte ne apartenas al la socia elito de siaj respektivaj loĝlokoj? Tia estas Sennacieca Asocio Tutmonda, mallonge SAT.

SAT, fondita en 1921, estas tutmonda laborista kaj ĝenerale maldekstrema asocio kun kleriga agado. Kiel tutmonda asocio kun individua membreco – kaj kun tiuj membraro kaj celdifino – ĝi estas unikaĵo. Ruĝaj fadenoj tiriĝantaj tra ĝia historio ekde 1921 estas laborista solidareco kaj memorganizita kleriga agado funkciantaj per senperaj baznivelaj kontaktoj. Tiuj kontrastas kun la internaciismo en ties kutime renkontata elformiĝo (kontaktoj inter nacinivelaj organizaĵoj, kiujn gvidas tiufakaj "specialistoj" kun konoj de fremdaj lingvoj). SAT solvas tiun laste menciitan problemon, la lingvan, per la lingve neŭtrala Esperanto. Unu el la fondintoj de SAT, Eŭgeno Lanti, klarigis pri tio : "La spirita kontaktiĝo inter la diverslandaj proletoj fakte okazas nur pere de poliglota intelektuloj. Tial la agado de SAT, celanta kunigi, intimigi senpere la laborulojn tutmondajn, estas esence revolucia."

Pro sia interindividua karaktero kaj malhavo de strukturo respegulanta la naciajn dividojn en la mondo, SAT karakterizas sin kiel *sennaciecan*, kaj superas per tiu kvalito je unu ŝtupo la *internaciismon*. Tiu fakto klarigas ĝian nomon: *Sennacieca Asocio Tutmonda*.

SAT okazigas ĉiujare en alia lando kongreson. Partoprenite de 70 partoprenantoj, la ĉi-jara 82-a deruliĝis en Milano inter la 18-a kaj 25-a de julio 2009. Kiel ĉiam, la kongreslingvo estis Esperanto, kompreneble kun sporada uzo de la itala por interkomunikiĝo kun reprezentantoj de la loka socio.



Ĉeestantoj al la 82-a Kongreso de SAT en Milano

Ĉi tiun kongreson organizis ARCI Esperanto, unu el pluraj laboristaj Esperanto-asocioj ligitaj kun SAT, kiuj agadas en unuopaj landoj aŭ lingvoregionoj. ARCI Esperanto estas samtempe branĉo de la agado de ARCI, t.e. Associazione Ricreativa e Culturale Italiana (Itala Kultura kaj Distra Asocio). Aliĝas al ARCI ĉirkaŭ 1.150.000 personoj, subdividitaj en ĉirkaŭ 6000 lokaj grupoj, kiuj okupiĝas interalie pri kulturo (arto, kino/televido, literaturo/poezio, muziko, teatro/danco), turismo, rajtoj, socia engaĝiteco, civila servo kaj internacia solidareco.

ARCI, tradicie proksima al la maldekstrularo, partoprenas en la monda socia forumo. Ĉi tiu kongreso multe kontribuis al la firmigo de rilatoj inter SAT kaj ARCI per reciproka agnosko de la sinkompletigaj diversaj ecoj kaj de komuna sennacieca agadspirito de la du asocioj, el kio rezultos, laŭ diversaj dumkongresaj diskutoj, kelkaj interesaj kunlaboroj. ARCI siavice organizis kelkajn pli distrajn partojn de la kultura-kleriga programo de la kongreso: ekskursoj al la Boromeaj Insuloj sur Lago Majora [Lago Maggiore], pertrajne de Domodossola al Locarno (Svisio), kaj rondirado jen al renesancaj jen al romiaj situejoj en Milano mem.

Al tiu kleriga programo apartenis ankaŭ prelegoj pri la sinteno de Gramsci al Esperanto, nekonataj (esperantlingvaj) verkistoj de Ukrainio, klasbataloj en Usono, etikaj bankoj (ARCI aktive partoprenas en la itala *Banca Popolare Etica*), forumoj pri Latinameriko, Mezoriento kaj Malagasio, de Anna Löwenstein pri sia nova historia romano en Esperanto pri la romia imperiestro Nerono, Morto de artisto. Inter la distraj vesperaj aranĝoj estis koncertoj de la grupoj *la Vojirantoj* kaj *Reverie*, kiuj plej trafe ilustris la tre aktualan temon de la Kongreso: "*Migri senlandlime, vivi sennaciece*", memorigante al la kongresantoj la migrad-malhelpan politikon de Italio kaj de multaj aliaj mondpartoj, en mondo, kies vivkondiĉoj iĝas pli kaj pli malfacilaj.

SAT klopodas funkcii kiom eble bazdemokratiece. Pro tio, signifan parton de la tempo kaj energio de la kongresanoj okupas kvar tutmatenaj ĝeneralaj membrokunvenoj, en kiuj membroj informiĝas kaj sin esprimas pri ĉiuj aspektoj de la asocia agado kaj prezentas demandojn kaj donas komisionojn al la Plenum-Komitato, la supera decidorgano

Por kelkaj subgrupoj de SAT, respektive organizaĵoj ligitaj kun ĝi, la SAT-kongreso prezentas oportunan okazon por okazigi ĉiujaran membrokunvenon. Tiel kunvenis ekzemple *ARCI Esperanto*, kaj ankaŭ pluraj "frakcioj" de SAT – kiuj fakte estas platformoj de similtendencanoj kaj ekzistas i.a. por rilati kun analogaj grupoj ekster SAT: la Pacista, la Komunista, la Liberecana kaj la Sennaciista Frakcioj de SAT. La Pacista Frakcio agadas favore al la Konvencio de Oslo kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj, instigante al intervenado, por ke kiel eble plej multaj ŝtatoj subskribu kaj ratifu tiun konvencion.



Membroj de la Komunista Frakcio kunvenis ĉi-foje kun Alessandro Rizzo, opozicia kvartalkonsiliano kaj membro de la alternativ-maldekstra partio *Demokrata Maldekstro*. Ĉe la sennaciistoj temas pri anoj de ideofluo, kiu ampleksas universalismon, radikalan kontraŭ-naciismon kaj praktikan utiligon de E-o kiel instrumenton de edukado al eksternacia pensado.

Unu el la kulminaj punktoj de la kongreso estis podia diskuto (kiun abunde partoprenis la publiko) inter Probal Daŝgupta, la prezidanto de UEA, kaj Jakvo Schram, prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT. Ĝi helpis prilumi la malsaman alirmanieron de la du asocioj al Esperanto : dum UEA unuavice propagas Esperanton tra la mondo, SAT esence uzas ĝin por siaj celoj (laŭ la statuta difino "klasbatalaj", kvankam estas periode floranta debato pri tio, ĉu tiu difino plu sufiĉas aŭ taŭgas). Novaĵo estas, ke la UEA-prezidanto ekdeviis de la ĝis nun jen kaj jen rimarkebla tendenco en UEA ĉirkaŭpreni kaj eĉ voli enkorpiĝi en si SAT. Probal Daŝgupta alvokis SAT "esti SAT", kompreninte ĝian specifan ne-Esperantomovadan rolon.

Malgraŭ la bonega etoso kaj, kompare kun pasintaj pli tempestaj kongresoj, pli harmonia disvolviĝo de la milana kongreso, la ĉeestantaj SAT-membroj ne havis la eblon forgesi pri unu problemo, kiu pensigas la asocion de kelkaj jaroj: malaltiĝanta membronombro, speguliĝanta ankaŭ en la malabunda partopreno en la kongreso: 70 partoprenantoj estas multe malpli ol en pasintaj jardekoj. Kialoj de tia situacio estas diversaj kaj ankoraŭ ne ĝisfunde esploritaj, sed tamen konstateblas ankaŭ revigliĝo de la ĝenerala etoso interna.

Disfloriĝas novaj projektoj, inter kiuj elstaras la atingoj de la Eldona Fako Kooperativa de SAT, kiu disvolvas de kelkaj jaroj sian agadon kaj refoje ĉi-jare eldonis du novajn gravajn klerigajn verkojn aparte aktualtemajn: *Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso* de Carlo Cafiero, kiu estas utila sinteza klarigo de la unua libro de La Kapitalo de Karlo Markso, kaj *Plano B - Mobilizo por savi civilizacion* de Lester R. Brown, kiu estas sinteza sed kompleta priskribo de la tutmonda ĝenerala krizo (ekologia, sociala, ekonomia, ktp) kaj la eblaj solvoj por ĝin limigi.



La estonteco de SAT aspektas sufiĉe promesoplena, des pli ke la laboro farota estas granda en streĉiĝanta tutmonda situacio: la lastatempe kreskinta memkonscio de SAT kune kun reemfazo de ĝiaj deoriginaj celoj kreis etoson, en kiu ĝi ideo pli malkatenas sin de la Esperanto-movado. Tio pli reliefiĝas ĝin kiel memstaran debatpartneron.

Montriĝas, ke kelkaj tradiciaj ecoj kaj motivoj de SAT bone agordiĝas kun kelkaj nun populariĝantaj maldekstraj agadformoj kaj motivoj:

- preteco de diversaj partie organizitaj tendencoj nedogmeme kaj malsekteme rilati inter si,
- reforma, bazdemokratie organizita kunlaboro de la diverstendencanoj, kaj
- kontraŭnaciismo, kiu poiome – apud aferoj kiel kontraŭrasismo kaj kontraŭseksismo – estiĝas unu el la kolonoj de maldekstra agado, tia, kia ĝi estis ekde la unua tago en SAT.

Same kiel disvolviĝanta floro allogas laboremajn abelojn, SAT dum sia kongreso allogis ses novajn membrojn, kio proporcie al la nombro de kongresintoj estas ja rimarkinda signo de la kamaradeca etoso kaj bonkvalito de la tuta programo.

La fama moto "Laboristoj de la tuta mondo unuiĝu!" denove en 2009 – kvankam etskale – iĝis realo en Milano, fortigante esperon je la kapablo de la homaro estonte starigi pli justan kaj senklasan mondon.

DEKLARACIO DE LA 82-a KONGRESO DE SAT

La 82-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunvenanta en Milano de la 18-a ĝis 24-a de julio 2009, substrekas, ke ĝia Statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj. Ĉi-jare, la kongresa temo estis "Migri senlandlime, vivi sennaciece". La kongresanoj de SAT, gastigitaj de la frata itala asocio ARCI Esperanto, debatis pri paco, hommigrado, etikaj bankoj, situacioj en Sudameriko, Malagasio, Mezoriento kaj aliaj mondregionoj. La Kongreso:

- o rememorigas al la Ambasadoroj de Ĉinio, Finnlando, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio kaj Usono, ke de pluraj jaroj SAT skribis por peti, ke tiuj landoj subskribu la Konvencion de Otavo. Ĝis nun, neniu el tiuj landoj subskribis ĝin. Denove, SAT firme petas, ke rapide ili subskribu tiun Konvencion de Otavo,
- o emfazas la rajton de la homoj el la tuta mondo memstare kaj libere elekti vivi kaj loĝi tie, kie ili naskiĝis aŭ kie ajn estas al ili plej taŭge pro naturmediaj kialoj, profesiaj, politikaj aŭ aliaj bezonoj, konsiderante sennaciece kaj senlandlime siajn proprajn interesojn kaj ankaŭ tiujn de la tuta homaro,
- o interesiĝas pri la projekto krei en 2010 Eŭropan Etikan Bankon per kunfando de tri nunaj etikaj bankoj (Banca Popolare Etica el Italio, NEF el Francio kaj FIARE el Hispanio), konsiderante, ke tiu banko verŝajne agos per pli etikaj rimedoj ol aliaj bankoj,

- rekonas en la agado de ARCI, itala laborista kulturcela asocio, komunajn agadspiriton kaj klerigajn celojn, kaj kuraĝigas la membrojn de SAT memstare partopreni en ĝia agado kaj tiel prepari ontan interesocian kunlaboron,
- agnoskas la gravecon de la malfacilaĵoj i.a. estigitaj de naciismo kaj kapitalismo, kiujn renkontas homoj en iuj mondregionoj kiel Sudameriko, Malagasio kaj Mezoriento, kaj celas klerigajn interŝanĝojn kun tiuj homoj por antaŭenigi nian komunan emancipiĝon.

GVIDREZOLUCIO

La 82-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunvenanta en Milano inter la 18-a kaj la 24-a de julio 2009,

- instigas la membrojn al akurata pago de kotizo por ebligi bonan funkciadon de la asocio per adekvata financado,
- konstatas la bonkvalitan laboron de la Eldona Fako Kooperativa de SAT kaj instigas SAT-anojn partopreni en ĝiaj eldon- kaj disvendoreto, en la koherigo de ĝia eldonpolitiko kaj en la klarigo de ĝia funkciado,
- esprimas sian aprezon al la sukcesaj laboroj ĝis nun jam plenumitaj pri la elektronika PIV kaj kuraĝigas la laborgrupon, kiu prizorgas ĝin, daŭrigi,
- alvokas al utiligo de la pretigata flugfolio pri SAT,
- invitas ĉiujn kamaradojn informi la membraron pri la situacio en siaj respektivaj mondregionoj per Sennaciulo, kaj emfazi la tutmondan rolon de SAT per kontaktiĝoj inter esperantistoj de diversaj mondpartoj por riĉigi sian klerigan laboron,
- instigas la kamaradojn kontribui al la SAT-retejo per sendado de materialo al ĝia respondeculo ĉu per rekta enretigo de originala materialo ĉu per traduko de la artikoloj troviĝantaj en la nacilingva parto (aparte koncerne tekstojn Kio estas SAT kaj Kio estas Esperanto),
- instigas SAT-anojn kontribui al Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo per verkado kaj sendado de artikoloj aŭ bildoj kaj per kontribuo al la redaktoskipo per diversaj taskoj inkluzive de kunlabora engaĝigo,
- proponas sistemigi per tradukreto la proponadon kaj tradukadon de nacilingvaj SAT-ece klerigaj tekstoj,
- petas, ke en la landoj subskribintaj la Konvencion de Oslo kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj kaj ĉie, kie eblas, la kamaradoj intervenu ĉe siaj regantoj, por ke ilia lando rapide ratifu tiun konvencion, kaj ke en ne subskribintaj landoj la kamaradoj intervenu ĉe siaj regantoj por ke ilia lando rapide subskribu kaj ratifu tiun Konvencion,
- plu vokas SAT-rondojn, SAT-frakciojn, LEA-ojn kaj SAT-anojn sendi precizajn informojn pri kursoj, varbado direktita al ekster-SAT-a medio kaj apero de artikoloj pri Esperanto aŭ SAT-rilataj temoj,
- sugestas kunvoki laborgrupon por prepari, per kolektado kaj debatigo de ideoj, deklaron de SAT pri ties rolo en la nuna epoko,
- invitas SAT-anojn informiĝi pri etikaj bankoj kaj pli precize pri la projekto de Eŭropa Etika Banko (EEB) kaj jam nun utiligi Esperanton en tiu banka medio per diversaj rimedoj (i.a. esperantigo de la fondmanifesto, flugfolioj kaj retejaj dokumentoj),
- invitas la Plenum-Komitaton studi la fondmanifeston de EEB kaj aliajn similajn iniciatojn, kaj eventuale proponi membriĝon de SAT post referendumo en tia kooperativa banko,
- petas la Plenum-Komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso estu antaŭvidita ebleco organizi klerigsesiojn pri financaj demandoj.

Por kontakti kun ni:

SAT-en-Hispanio (SATEH)

Poŝtkesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid

esperanto@nodo50.org

<http://www.nodo50.org/esperanto>